

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 38-a BRAZILIO, APRI LO-MAJO-JUNIO 2014 N-ro 154

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

EDUKADO KAJ MORALA PERFEKTECO



dukado, se bone komprenata, estas la ŝlosilo de l' morala progreso; kiam oni konos la arton direkti karakterojn, tiel bone kiel la arton direkti intelektojn, oni povos korekti la karakterojn tute same, kiel oni korektas misformajn arbojn; sed tiu arto postulas grandan takton, multe da sperto kaj profundan observadon; estas grava eraro kredi, ke sufiĉas scio, por ĝia praktikado. Kiu sekvas la kreskadon de infano, ido ĉu de riĉulo, ĉu de malriĉulo, de post ĝia naskiĝo, observante ĉiajn malutilajn influojn, kiuj agas sur ĝin pro la malforteco, senzorgeco kaj neklereco de ĝiaj direktantoj, vidante kiel ofte la rimedoj uzataj por ĝia moraligo tute maltrafas, tiu ne povas miri pro tiom da malbonaj flankoj en la socio. Oni faru

por moralo tiom, kiom oni faras por intelekto, kaj oni vidos, ke, se ekzistas rezistemaj naturoj, estas ankaŭ aliaj, cetere multe pli, ol kiel oni kredas, kiuj atendas nur bonan kulturadon por produkti belajn fruktojn. Egoismo estas fonto de ĉiaj malvirtoj, kiel karitato estas fonto de ĉiaj virtoj; eldetru la unuan kaj plifortigi la duan, jen la celo, kiun devas iri ĉiuj klopodoj de la homo, se ĉi tiu deziras certigi sian feliĉon tiel sur la Tero, kiel en estonta vivo. Allan Kardec

KARDEC, Allan. *La Libro de la Spiritoj*. El la franca lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2007. Demando 917.



PRI ALMANAKO LORENZ



Dankas nian uzbekan amikon ANATOLI IONESOV (sur la foto), kiu ĝentile sendis al ni siajn impresojn pri ALMANAKO LORENZ. Fratan brakumon, karega!

Vian Almanakon mi, verŝajne, vortumus jene:

aĝe - respektinda, kovrile - bela, aspekte - alloga, enhance - multfaceta, artikole - pensveka, teme - varia, bilde - riĉa, litere - granda, kajere - impona, volume - montrinda, papere - agrabla, foliume - tuŝinda, aŭtore - diversloka, tekste - internacia, redakcie - kompetenta, aperritme - akurata, geografie - fora, spirite - proksima, etose - amika, kulture - bunta, intelekto - kleriga, opinie - tolerema, lingve - bona, Esperante - fundamenta, neologisme - rara, preserare - malabunda, legantare - plimultiginda, eldonkvante - plikreskinda, abone - subteninda, future - daŭriginda, unuvorte - leginda aŭ eble eĉ legenda! Dezirante al vi daŭran sukcesplenan almanakadon, restas, kun amikaj salutoj, Anatoli.



AMIKOJ DE LORENZ

KOMUNIKOJ ĉi-numere frate brakumas nian amikon **JOSÉ PASSINI**. Doktoro pri Lingvistiko, li estis rektoro de Federacia Universitato de “Juiz de Fora”. Spiritisma preleganto kaj verkisto, **PASSINI** ankaŭ estas granda disvastiganto de Esperanto. Li publikigis universitatan disertaĵon pri la Internacia Lingvo, “Bilinguismo: utopia ou antibabel?” (= Dulingvismo: utopio aŭ kontraŭbabelo?).

Al li,
niajn
korajn dankojn
kaj bondezirojn!



DIA GLORO

Amo estas la lumo de la mondo,
Kiel Suno la Forto de la Tero.
Estas reĝo la Amo en la rondo
De kreitoj vivantaj en etero.

Por ĉenitaj al kota materio
Lumo taŭgas nur plej materiala;
Ne pli bonan konsentus Bona Dio
Luman fonton de Sia regn' astrala.

Vi bezonas de l' Suno la helecon
Kaj la varmon, por vivo malsupera;
Sed la Grandaj ja havas mem lumecon,
Kian homo ne havas, ĉar mizera.

Tamen, homo, al Patro la rigardon
Ĉiam levu, en danko kaj fervoro;
De la gloro de l' tag' prikantu ardon,
Ero estas ĝi mem de l' Dia Gloro!

1/4/1947

M. Solovjev [Spirito]



CARREIRO NETO, Luís da Costa Porto. Mediuma Poemaro. Poemoj originale verkita en Esperanto, de pluraj aŭtoroj, medieme skribitaj. Aranĝis la poemojn kaj tradukis la antaŭparolon A. K. Afonso Costa. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1972. p. 21.



KUNLABORU! COLABORE!
Membrigu ĉe **LORENZ** kaj helpu
la disvastigon de Esperanto kaj
Spiritismo en la tuta mondo!

*Associe-se à LORENZ e auxilie
a divulgação do Esperanto e do
Espiritismo em todo o mundo!*

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Fondita la 15-an de decembro 1975
Jaro 38-a – n-ro 154 – Aprilo-Majo-Junio 2014

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: [Editora Lorenz](https://www.facebook.com/EditoraLorenz) | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Majnov, VII. 1889

Estimata amiko!

Cenzuriston en Varsovio mi jam havas, kaj baldaŭ komencos eliradi novaj verkoj. Mezajn vortarojn en diversaj lingvoj mi ne povas nun ankoraŭ eldoni pro manko de mono. Sed, kiam mi nur havos la eblon, mi penos eldoni plej baldaŭ la mezan vortaron internacia-francan kaj poste internacia-rusan.

Al Majnov, VII. 1889

Estimata amiko!

Viajn leterojn kun la promesoj kaj ankaŭ la 15 kop. por la gramatiko kaj vortareto mi recevis. La vortaron svedan la cenzuro ne subskribis ankoraŭ, “por ellasi en la mondon”, kaj tial mi povas ĝin sendi al vi ne pli frue ol en la venonta semajno aŭ post 10 tagoj.

10 apartajn antaŭparolojn mi hodiaŭ elsendis al vi. Pri la vortaretoj mi petas vin skribi al mi klare kiom da vortaroj vi bezonas kaj en kiuj lingvoj; ĉar laŭ mia kondiĉo kun mia presisto mi devas al li antaŭpagi nun aparte por ĉiu ekzemplero kiun mi prenas de li. Por ne perdi monon mi devas nun tial klare scii kiajn verkojn kaj en kia nombro mi devas preni de li.

Al Majnov, VIII. 1889

Estimata amiko!

La 12 kop. por gramatiko mi recevis. La deziritajn 14 vortarojn mi hodiŭ sendis al vi.

Mia presisto preskaŭ tute ne komprenas la lingvon Esperanto.

La poŝtajn signojn alilandajn mi vendas al la malgrandaj bankieroj, sed mi multe perdas ĉe la vendado.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof: originalaro 1: unua etapo de Esperanto: 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989.



RENKONTIĜO EN “LORENA”

La 1-an de Junio 2014, okazis en la urbo “Lorena”, en la brazila ŝtato San-Paŭlo, pli unu RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN PARAIBA VALO. En tre agrabla etoso, kunsidis pli ol kvardek homoj el deko da urboj el tri ŝtatoj. De la naŭa horo ĝis la dek-sesa kaj duono ĉiuj kunvenis ĉe la Kulturdomo de “Lorena”. Post akcepta lunĉo, Aleksandro Prado (sur la foto) prelegis pri rimedoj por havigo de flueco en fremda lingvo – inkluzive de Esperanto. La publiko vigle diskutis la aferon. Antaŭ la tagmanĝo, la tuta grupo promenis tra la urbocentro portante Esperantan flagon kaj rubandojn, disdonante

centojn da flugfolioj kaj vizitante historiajn konstruaĵojn. Posttagmeze, oni aŭskultis “Guton da gramatiko” kaj paroligan ekzercon per projekciado de interesveka filmeto, sub la gvido de José Roberto Tenório, prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo. Sekvis informoj fare de Givanildo Ramos Costa (Kultura Kooperativo de Esperantistoj), Alan Argolo (Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro) kaj José Roberto Tenório (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo). Poste prelegis Maria Nazaré Laroca pri la temo “Ĉu poezio estas necesa?” kaj Francisco S. Wechsler, pri la revuo “Brazila Esperantisto”. La longatinga radistacio “Aparecida” informis pri la evento. Dum la tuta tago funkciis eta libroservo kaj vendado de Esperanto-ĉemizoj kaj objektoj. La proksima renkontiĝo en Paraiba Valo okazos en Oktobro 2014, en la ŝtato Rio-de-Ĵanejro.

Informoj de nia kara samideanino MARIA NAZARÉ LAROCA, publikigitaj en Interreto.

SPIRITISMA VOJAĜO EN KUBO – RAPORTO PRI DOKTRINA DISVASTIĜO



Un granda ĝojo Asocio Lorenz ricevis de nia samideano el la urbo Ipatinga, CLÓVIS A. PORTES, raporton pri vojaĝo realigita en Aprilo 2014, kun la celo disvastigi Spiritisman Doktrinon en Kubo. Estas por bulteno KOMUNIKOJ vera spirita plezuro publikigi informojn pri tiu frateca laboro, ĉar ĝi kongruas kun la disvastigaj idealoj de ASOCIO LORENZ. Oni rekonas, ke spiritisma movado en Kubo spertas specialan momenton per la organizado de nacia federacio. Ĉia apogo kaj subteno al tiu klopodo estas bonvena! Niaj

karaj amikoj el Kubo, ricevu niajn fratajn bondezirojn! Ni dankas kaj gratulas al nia kara samideano Clóvis, petante al Dio, ke la Superaj Spiritoj subtenu kaj fruktigu lian bonvolemon.

Inter la 24-a kaj 29-a de Aprilo 2014, realiĝis spiritisma disvastiga vojaĝo en Kubon, cele al partopreno en frateca aranĝo en la urbo "Holguín". Per tiu renkontiĝo, kiu ricevis la apogon kaj kunlaboron de la lokaj aŭtoritatoj, oni provis fortikigi Spiritismon en Kubo, per subteno al la federacia movado. En la evento ĉeestis ĉirkaŭ 380

spiritistoj, venantaj el diversaj regionoj de Kubo.

Ĉi tiu evento estas la rezulto de multjara laboro pri doktrina disvastigo, kiu komenciĝis en 1994. Ekde la komenco, antaŭ dudek jaroj, la kunordigantoj de tiu frateca klopodo spertis plurajn sociajn kaj financajn malfacilaĵojn. Malgraŭ tio oni sindoneme laboris por la kunfratiĝo de la spiritistoj kaj por la plibonigo de la organiza movado.

Realigi prelegojn en la federacia evento kaj en aliaj grupoj, nome Spiritisma Societo Allan Kardec kaj Spiritisma Societo Amalia Domingo Soler.



Sur la fotoj: Malfermo de la evento kaj ties partoprenantoj.

TREJNADO POR KURSGVIDANTOJ



Departemento pri Edukado de AERĴ – Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro – organizis la 16-an TREJNADON POR KURSGVIDANTOJ DE ESPERANTO, la 27-an de Aprilo, en Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga.

Kun la temo “La Instruado de Esperanto por Specifaj Grupoj”, ĉi-jare la trejnado alportis diferencajn enfokusigojn:

oni celis prezenti al la kursgvigantoj teknikojn kaj strategiojn por vekti kaj konservi la intereson en la plej variaj tipoj de studentoj: infanoj, adoleskuloj, junuloj kaj plenkreskuloj, kontribuante por ke malkreskigu la elŝteliĝon de lernantoj el la klasoj. Per la retadreso **disvastigo.aerj@gmail.com** oni trovi aliajn informojn pri tiu oportuna temo kaj pri la cetera agado de AERĴ.

TRIA KUBA ESPERANTO-RENKONTIĜO (KER) 2014



aŭ informoj de nia kara amiko el Kubo, Juan Carlos, la 3-a KER, tutlanda E-renkontiĝo, okazis en la bela provinco "Pinar del Río", ĉe Valo de "Viñales", en kampadejo "Dos Hermanas". La montoj de "Viñales" estas deklaritaj Kultura Natura Heredaĵo de la Homaro, flanke de Unesko ekde 1999, pro la belegaj pejzaĝoj kaj la konservado de antikvaj laborformoj en la kamparo.

Dum kvin tagoj ariĝis 134 partoprenantoj el preskaŭ la tuta lando. De la 12-a ĝis la 16-a de Marto okazis diversaj E-aranĝoj: la 30-a komitatkunsido de KEA (Kuba Esperanto-Asocio), la balotado por nova mandato 2014-2017 de KEA-estraro, la KEA-ekzamenoj (baza kaj meza), ekskursoj (padumado al la Valo kaj al Belvidejo "Los Jazmines"), didaktikaj ludoj, la metiejo pri tradukado, libroservo, origamio, radioamatorismo, retrokurado, sorobano, tabulludoj, interaliaj aranĝoj. La radiostacio "Papilio" funkciis ĉiutage dum 15 minutoj. Ĉiuvespere okazis arta vespero, dum kiu koncertis la repa duopo Fratoj El kaj la grupo Amindaj, ambaŭ el la orienta provinco "Santiago de Cuba". Oni jam ekpensas pri la venontjara KER, okazonta en la orienta urbo "Santiago de Cuba".



LA PAROLO ESTAS KREIVA

"Sed tio, kio eliras el la buŝo, elvenas el la koro, kaj profanas la homon." – Jesuo (Mateo 15:18)



Ĉiu instruo de la Majstro, sub la vualo de l' litero, enhavas profundan averton.

Estas necese prizorgi la koron, kiel elsendilon de la parolo, por ke oni ne perdu la harmonion bezonan al sia propra feliĉo.

Kio elvenas el la koro kaj el la menso tra la buŝo, tio estas viva pulsanta forto, kiu tiras la homon al la bono aŭ al la malbono laŭ la naturo de la elsendo. [...]

El la koro de l' maliculoj, perversuloj kaj malhumanuloj naskiĝas, per la potenco de la parolo, la faloj, la krimoj kaj la maljustaĵoj; sed ne senpune ili

agigos tiajn perturbajn elementojn, ĉar tago venos, kiam ili rikoltos la amarajn fruktojn de la malfeliĉa movado, kiun ili impulsis.

Sammaniere la ĝojo semita per edifa, bonefika parolo, kreskas kaj donas siajn fruktojn.

La frata helpo disĵetas senlimajn bonfarojn, kaj la parfumo de l' bono, eĉ se verŝita sur la sendankajn, revenas per nevideblaj ondoj por refreŝigi la ĝin elsendantan frunton.

La bona ago estas bonefika forto en konstanta aktiveco ĉirkaŭ ties plenumanto.

Estas nemezureblaj, edifaj energioj ĉirkaŭ tiuj, kiuj tenas vigla la flamon de la bonaj pensoj por lumigi la

aliulajn vojojn per stimule nobla konversacio. [...]


Estas nepre necese vigli super la buŝo, ĉar la parolo kreas, sugestas, inklinigas, ŝanĝas, renovigas aŭ detruas, kiel vivanta disradiado de nia personeco.

Ĉiutage, en ĉiuj okazaĵoj de la vivo, ni rememoru kun la Dia Majstro, ke la parolo elvenas el la koro kaj ja tial profanas la homon.

XAVIER, Francisco Cândido. *Vinha de luz (= Vinberejo el lumo)*. Per la Spirito Emmanuel. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1951. ĉap. 97. Publikigita en Esperanto en la revuo *Reformador*, Novembro 1987, p. 335.

ESPERANTISTAJ POETOJ

Esperantisto, Ekesto kaj Malapero
Raymond Schwartz



Gazetartikolo	Post hezito
Aŭ varba parolo.	Delegito.
Favora impresio,	Laŭ bezono
Ekintereso.	Gazetabono,
Lernolibro,	Kotizoj
Sankta vibro,	Kaj valizoj
Propaganda miasmo:	Por kongreso.
Entuziasmo!	Miraklimeso!
Samideano,	Fraka vesto,
(Je via sano!)	Bala festo,
Kamarado,	Naci-kostumo,
Varbado,	Amindumo.
Instruo,	Hispanino,
En butontruo	Korinklino
Verda flago,	Kaj esperoj.
Gloro tago!	Amletoj.
	Mielo,
	Ĉielo!

	Edzino:
	FINO!!

Plua ŝtupo
Nova grupo.
Nova sento,
Facila vento
Kaj poemo
Pri sama temo!

Poemo de Raymond Schwartz el la verko Verdkata Testamento, represo de la eldono Paris 1926, eldonita de ILTIS-Eldonejo en 1992. RAYMOND SCHWARTZ (1894-1973), franco, banka oficisto. En 1913, li fondis Esperanto-grupon Amika Rondo. Fondinto kaj gvidanto de la fama Esperanto-Kabaredo Verda Kato inter la jaroj 1920-1926. De 1933 ĝis 1939 li kunlaboris kun la kabaredogrupoj La Bolanta Kaldrono kaj poste, en Parizo, en 1950, fondis la kabaredon Tri Koboldoj kaj ĝin funkciigis ĝis la jaro 1956-a. Publikigis poemojn kaj artikolojn en diversaj gazetoj kaj kunlaboris kun pluraj aliaj kiel "Literatura Mondo", "Franca Esperantisto", "La Nica Literatura Revuo" kaj "Sennacieca Revuo". Raymond Schwartz estis kaj estas unu el la plej popularaj figuroj de nia literaturo, kies 'gaja muzo' li estas. Li estis humoristo kaj satiristo, verkinta prozon, poezion kaj dramon. Verkoj: Verdkata Testamento, Prozo Ridetanta, Anni kaj Montmartre, La Stranga Butiko, La Ĝoja Podio, Kiel Akvo de l' Rivero, Ne Kiel Meier: Invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio en Esperanto, Kun Siaspeca Spico, Vole ... Novele: aŭ kvindek jaroj da noveloj. (Resumo el informoj trovitaj en "Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj", verkita de Josip Pleadin k eldonita de GRAFOKOM en 2006.)

EL LA EVANGELIO – LA PLEJ GRANDA ORDONO

Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj dua estas simila al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta leĝo kaj la profetoj. Mateo, 22:37-40

do, kion oni faras kontraŭ la proksimulo, estas farata kontraŭ Dio. Ĉar oni ne povas ami Dion, ne praktike karitaton al sia proksimulo, tial ĉiuj devoj de la homo resume troviĝas en jena maksimumo: Ekster karitato, nenia savo.



karitato kaj humileco, jen la sola vojo por la savo; egoismo kaj fiero, jen la vojo al la pere. [...] Oni ne povas vere ami Dion, ne amante sian proksimulon, nek ami sian proksimulon, ne amante Dion; ĉio

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. 15 – Ekster karitato, nenia savo. §§ 4-5 – La plej granda ordono.